Rainer Maria Rilke,

Sovaĝa rozarbusto

tradukita de Manfredo Ratislavo

Jen antaŭ pluvĉielo krepuskanta
en sia pura juno staras ĝi,
donace siajn branĉojn etendanta
kaj tamen enplonĝinta nur en si;

kun ĝiaj plataj floroj malfermite,
senflege kaj sen ia ordigem',
tiele de si mem superigite
kaj ekscitite tute el si mem,

ĝi vokas la migranton pripensantan,
pretervenantan tiun vojon ĉi:
Ho, vidu senprotekte min starantan,
ja ĉion bezonatan havas mi.

Traduko de la Germana poemo "Wilder Rosenbusch" de Rainer Maria Rilke *(Rajnero Mario Rilko, ∗1875-12-04 – †1926-12-29) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1996.*

MR-297-1 / Arg-780-1563 (2013-01-19 11:47:55)

Vidu ankaŭ: http://www.zgedichte.de/gedicht_2739.html. Pri la poeto vidu: http://eo.wikipedia.org/wiki/Rainer_Maria_Rilke.